

LA EPISTOLO DE LA APOSTOLO PAŬLO AL FILEMON

¹ Paŭlo, malliberulo por Kristo Jesuo, kaj Timoteo, la frato, al Filemon, nia amato kaj kunlaboranto,

² kaj al Apfia, la fratino, kaj al Arĥipo, nia kunbatalanto, kaj al la eklezio en via domo:

³ Graco al vi kaj paco de Dio, nia Patro, kaj de la Sinjoro Jesuo Kristo.

⁴ Mi ĉiam dankas mian Dion, memorigante pri vi en miaj preĝoj,

⁵ aŭdinte pri via amo kaj pri la fido, kiun vi havas al la Sinjoro Jesuo kaj al ĉiuj sanktuloj;

⁶ por ke la partoprenado en via fido fariĝu energia per la sciigo de ĉiu bonaĵo, kiu estas en vi, por Kristo.

⁷ Ĉar mi tre ĝojis kaj havis multon da konsolo pro via amo, ĉar la koroj de la sanktuloj refreŝiĝis per vi, frato mia.

⁸ Kvankam do mi havas plenan kuraĝon en Kristo, por ordoni al vi tion, kio estas konvena,

⁹ tamen pro la amo mi preferas petegi tia, kia mi estas, Paŭlo, maljunulo kaj nun ankaŭ malliberulo pro Kristo Jesuo;

¹⁰ mi petegas vin koncerne mian filon, kiun mi naskis en miaj katenoj; tio estis Onesimo,

¹¹ kiu estis iam senutila por vi, sed nun estas utila por vi kaj por mi;

¹² mi ĵus resendis al vi lin mem, alivorte, mian propran koron;

¹³ lin mi volonte ja tenus apud mi, por ke anstataŭ vi li estu al mi helpanto en la ligiloj de la evangelio;

¹⁴ sed mi nenion volis fari sen via konsento; por ke via boneco estu ne kvazaŭ deviga, sed laŭvola.

¹⁵ Ĉar eble li pro tio estas apartigita for de vi por kelka tempo, por ke vi havu lin por ĉiam;

¹⁶ jam ne kiel sklavon, sed kiel pli bonan ol sklavo, kiel fraton amatan, precipe por mi, sed des pli por vi, kaj en la karno kaj en la Sinjoro.

¹⁷ Se vi do rigardas min kiel kunulon, akceptu lin tiel same, kiel min mem.

¹⁸ Se tamen li faris ian malhonestaĵon, aŭ ŝuldas ion al vi, tion enkalkulu en mian konton;

¹⁹ mi, Paŭlo, skribas per mia propra mano, mi ĝin repagos; mi tamen ne diras al vi, ke vi viaparte ŝuldas al mi eĉ vin mem.

²⁰ Jes, frato mia, lasu min havi plezuron de vi en la Sinjoro; refreŝigu mian koron en Kristo.

²¹ Fidante pri via obo, mi skribas al vi, sciante, ke vi faros eĉ pli multe, ol kiom mi diras.

²² Sed krom tio pretigu por mi gastoĉambron; ĉar mi esperas, ke mi, laŭ viaj preĝoj, estos donita al vi.

²³ Salutas vin Epafras, mia kunmalliberulo en Kristo Jesuo,

²⁴ Marko, Aristarĥo, Demas, Luko, miaj kunlaborantoj.

²⁵ La graco de nia Sinjoro Jesuo Kristo estu kun via spirito. Amen.

Londona Biblio
The Holy Bible in Esperanto (1910)

Public Domain

Language: Esperanto

2020-02-13

PDF generated using Haiola and XeLaTeX on 18 Apr 2025 from source
files dated 31 Aug 2023
66d4141f-915d-52bc-b744-29459ca87515